

*José Antonio del Barrio*

*Fundación Esperanto, Zaragoza, Hispanio*

## **Recenzo de la libro**

**Garvía Soto, Roberto. 2021. *Lengua y utopía – El movimiento esperantista en España, 1890–1936*.  
Granado: Editorial Universidad de Granada.**

**Libro havebla en la eldoneja retejo:  
[https://editorial.ugr.es/libro/lengua-y-utopia\\_138874/](https://editorial.ugr.es/libro/lengua-y-utopia_138874/)**

En la pasintaj jaroj, kiam – kiel prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio aŭ en alia maniero reprezentanto de la esperantista movado en Hispanio – mi renkontiĝis kun samlandano por informi pri la lingvo, tre ofte mi trovadis reagon kun demando, ĉu mi estas anarkiisto, aŭ suspekto ĉu mi estas framasono, aŭ alimaniere sugestantan ian radikalan alternativan politikan vidpunkton. Se en la konversado oni krome menciis ke tutlanda hispana esperantista asocio ekzistas ekde la fino de la 40aj jaroj, ĉe la plej malhela pinto de la diktatoreco, multaj homoj surpriziĝas. Kiel tio eblis?

Esperantistoj ĝenerale konscias ke nia movado estas sufiĉe plurala kaj diversa. Tamen, almenaŭ en Hispanio, ankoraŭ restas la ideo pri ia ĉefa politika fluo, eĉ inter esperantistoj mem.

Tiu antaŭjuĝo estas sufiĉe ofta kaj evidente havas ian radikon: framasonoj ja estis kelkaj el la ĉefaj gvidantoj de la hispana movado antaŭ la intercivitana milito, kaj por tiamaj anarkiistoj Esperanto estis kvazaŭ integra parto de la liberecana mondkoncepto. Ankaŭ veras, ke en la hispana socio ekzistis komence de la 20a jarcento unu evidenta granda divido, tiu inter dekstremaj kaj maldekstremaj fortoj, kiuj radikaliĝis dum la 30aj jaroj ĝis kiam la kunvivado aspektis neebbla, kaj eksplodis tiu konflikto, en kiu plejmulto de la esperantista movado prenis unu partion (tiun de la registaraj/respublikanaj/revoluciaj fortoj). Enestas do ia vero en tiuj antaŭjuĝoj, sed la historio de la esperantista movado montras pecon de socio multe pli kompleksa, tiun en kiu kunvivis katolikoj kun framasonoj kaj laboristoj kun konservativuloj, dum samtempe okazis gravaj streĉitecoj interne de la movado koncerne organizadon, strategion aŭ personajn interesojn, kiuj havis apenaŭ rilaton kun la supozata dekstra-maldekstra akso kiu dividis la socion.

Ekspliki tiujn miskomprenojn estas unu el la ĉefaj celoj de la libro *Lengua y utopía. El movimiento esperantista en España, 1890-1936*, de Roberto Garvía, eldonita de la Universitato de Granada. Ĝi esploras la ideojn kurentojn de la hispana esperantista movado antaŭ la komenco de la interna milito, ĝiajn konfliktojn kaj kunlaborojn, ĝian pluralecon kaj komunajn trajtojn.

Roberto Garvía estas profesoro pri Sociologio en la Universitato Carlos III (Karlo la 3a) de Madrido. Li estas prestiĝa profesiulo, aŭtoro de diversaj referencaj libroj en tiu fako, ĝeneralaj aŭ pri temoj kiel la loterio en Hispanio. En la lastaj jaroj li dediĉis ampleksan kaj tre gravan atenton al la helplingvaj movadoj, kaj specife al Esperanto. Krom diversaj artikoloj kaj prezentadoj en konferencoj, lia ĉefa verko ĝis nun en tiu ĉi kampo estas la libro *Esperanto and its rivals*, eldonita en 2015 de la Universitato de Pensilvanio (University of Pennsylvania Press) (Garvía 2015).

La nuna libro estis eldonita de la Universitato de Granada. Ke tiu prestiĝa institucio kaj agnoskita universitata profesoro pretas eldoni libron pri la historio de la esperantista movado, kiu ĝis antaŭ nelonge estis konsiderita en akademaj rondoj kiel marĝena komunumo, propra de alternativuloj kaj neinteresa por neesperantistaj fakuloj, estas unu el la lastatempaj manifestiĝoj de la salutinda kresko de la akademia prestiĝo de Esperanto kaj la esperantista komunumo, kaj sendube la plej grava en Hispanio.

La verko dividiĝas en 6 partoj, kun 27 ĉapitroj, plus enkonduko, konkluda ĉapitro, bibliografio kaj indoksoj.

La unua parto ('Nova lingvo por nova socio') faras enkondukon al Esperanto, kun bazaj faktoj pri ĝia kreado, por ĝenerala publiko. Ĝi ne eniras en la lingvajn ecojn kaj apenaŭ konsideras la kulturajn flankojn, sed ĉefe fokusiĝas en la konsisto de la movado internaciskale, la homoj kiuj alprenis la lingvon kaj iliaj celoj. Oni komentas la diversecon de la movado, ankaŭ je tiu internacia nivelo, kaj la utopiecon de multaj el ĝiaj aliroj, kun aparta pritrakto al la "interna ideo" kaj la ideologio de Zamenhof.

Dua parto estas dediĉata al la pioniroj en Hispanio, la alveno de Esperanto kaj la unuaj provoj de propagando.

La tria ĉapitro estas dediĉata al la Esperantismo en Katalunio kaj ties konfliktoj kun la cetero de Hispanio. Kiel estas bone konate, la movado en Katalunio estis dum kelka tempo tre vigla, kun propraj ecoj, derivitaj de la kompleksa socio de tiu teritorio. La alveno de Esperanto koincidis kun la naskiĝo kaj fortiĝo de la kataluna naciismo, kaj la disvolvo de la kataluna movado estis kompreneble influita de la ĉirkaŭanta socio kaj ties streĉitecoj. La kunvivo kun la tuthispana movado ne estis ĉiam facila: ekzistis momentoj de kunlaboro kaj integriĝo, kaj aliaj de fortaj kunpuŝiĝoj, kiuj foje translokiĝis ekster la movadon, al la administraj kaj juĝaj instancoj. La libro priskribas la ĉefajn etapojn kaj ĉefrolulojn de tiu movado kaj tiuj

streĉitecoj, tre detale. Ĝi faras bonan laboron nuanciĝi multajn asertojn pri ĝi, malkovrante la pluralecon ankaŭ ene de tiu teritorio.

Ĝi estas la plej ampleksa ĉapitro de la libro (30 elcentoj el la teksto, se oni ne enkalkulas indeksojn, bibliografion kaj simile), kaj estas diskutinde ĉu la detaligo estas eble troa, se oni konsideras la kompare tre mallongan atenton al la movadoj en aliaj regionoj, sed ja veras ke por legantoj neesperantistaj povas esti pli interesa la drameco de la okazintaĵoj en Katalunio, kontraste kun la kompare paca karaktero de la movado en, ni diru, Valencio aŭ Andaluzio, aliaj polusoj de la movado en Hispanio. Krome, tiuj okazaĵoj havas ĝeneralan intereson, kaj bone emfazas la kompleksecon de movado kiu ofte estas imagita kiel unueca aŭ disciplinita.

La kvara parto pritraktas la laboristan esperantismon. Post mallonga konsiderado al la internaciaj lingvoj en la laborista movado kaj enkonduko en la ĝenerala laborista esperantista movado, kun informoj pri SAT kaj Lanti, oni mencias la diversajn provojn organizi la esperantistajn laboristojn en Hispanio. La aliro ĉikaze estas plejparte geografia: kun priskribo de la iniciatoj en diversaj urboj kaj regionoj. Tiu aliro estas probable neevitebla, pro la malsukceso de tiu parto de la movado organiziĝi je tutlanda nivelo. Kontraste kun aliaj landoj, oni neniam sukcesis krei hispanan laboristan asocion, kun la influo kiun ĝi povus esti akirinta. Kvankam estas priskribata la evoluo de la plej ambicia de tiuj provoj (la PUIL,<sup>1</sup> supozeble eĉ iberamerika, sed en la praktiko preskaŭ nur kataluna), ne estas klare kial tutlanda kunordigo neniam sukcesis.

Mi ankaŭ sentis la mankon de pli profunda analizo pri la esperantismo ligita al la anarkiisma movado. Tiu ja estas tre grava kaj speciala, kompare kun aliaj landoj. Esperanto estas ofte pritraktata en historioj pri la liberecana movado en Hispanio; kiel mi menciis je la komenco, ĝi eĉ fariĝis kvazaŭ simbolo de la anarkiismo. Esti anarkiisto signifis almenaŭ simpatii kun Esperanto, ofte ankaŭ lerneti ĝin, kaj foje eĉ komenci ĝian utiligon. Sed restas esplorinda la vera engaĝiĝo, praktika, kun la lingvo, kaj la praktikado ekster la propraj rondoj. Jen kaj jen en la libro estas mencioj al tiu parto de la komunumo (se tiel oni povas diri, konsiderante ĝian oftan izolitecon), sed pli profunda esplorado pri ĝi restas ankoraŭ pendanta (dume Javier Alcalde faris menciindajn progresojn en tiu esplorkampo).

La kvina parto pritraktas aliajn kolektivojn en propraj ĉapitroj, nome, la instruistojn, la blindulojn, la militistojn kaj la virinojn. Ĉiuj kvar estas tre interesvekaj en si mem. La intereso pri Esperanto inter multnombraj instruistoj estas rimarkinda, interalie ĉar ĝi koincidis kun aliaj fluoj en la socio, kiel la movadoj por pedagogia renovigo kaj la debatoj ene de la hispania socio pri la rolo de la instruistoj. La blindula movado estis surprize aktiva, kaj

---

1 Prolet-Esperantista Unio de Iber-Amerikaj Landoj.

havis tre grandan influon en la ĝenerala socio: esperantisto estis ekzemple la postmilita prezidanto de la hispana asocio de blinduloj, ankoraŭ nun modelo pri organizado kaj socia integriĝo en la tuta mondo, kaj blindulo estis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio en la 70aj jaroj. Ankaŭ surpriza povas aspekti por multaj la grava rolo de militistoj en la hispana Esperantismo; ankaŭ tie ekzistas mito pri la konservativemo de la hispanaj militistoj (nutrita precipe de la ĉefroleco de militistoj en la puĉo de 1936), sed, kiel mi mem jam pritraktis en aliaj okazoj, la militistoj tiamaj estis tre pluralaj kaj ne malofte ili ĉefrolis en la transporto al la duoninsulo de scioj el aliaj landoj (ekz. en scienco kaj inĝenierado); ne estas tiom strange ke ili prenis gravan rolon en la disvastigo de Esperanto, kaj, samtempe, estas montrado de tiu diverseco la fakto ke esperantistaj militistoj, kiuj estis kunlaborintaj en la movado en la antaŭaj jaroj, alfrontiĝis poste en la sama milito. Pri la virinoj, la libro faras tre bonan laboron en la reliefigo de la rolo de diversaj virinoj en la disvastigo, instruado kaj organizado de Esperanto, kaj en la analizado de la diversaj aliroj de la virinoj, foje en tradiciaj roloj, sed ankaŭ en iuj kazoj kiel pioniroj en la unua feminisma movado; mi nur bedaŭras, denove, ke la ĉapitro estas tro mallonga.

La sesa parto koncernas la ensociigon de Esperanto, la sociajn rilatojn inter esperantistoj, kun ekzemploj pri la praktika uzo de la lingvo. Ĝia dua ĉapitro esploras la ekzemplon de praktika esperantismo montratan de la kampanjo por gastigado de aŭstria infanoj en familioj de Hispanio post la unua mondmilito.

Kiam oni alvenas al la konkluda ĉapitro oni sentas ke la libro lasis nestudataj kelkajn aspektojn de la komunumo (kiel la kultura produktado) kaj kolektivojn. Sed estas la aŭtoro mem kiu agnoskas tiun fakton kaj pravigas sian decidon. Fakte, oni povas tiun ĉapitron vidi kiel programon de esplorado, espereble de la sama aŭtoro, pri la malplenoj en nia konado pri la movado.

Speciale, se en la komenco de la libro (kaj de tiu ĉi recenzo) oni aludas al la renaskiĝo de la movado en la unuaj jaroj de la frankismo, la libro prezentas bonan enkondukon al la cirkonstancoj kiuj faris ĝin ebla, sed nur sporade eniras en tiun periodon. Tio certe estas intenca, kiel pruvas la datoj en la subtitolo de la libro, sed fariĝas kvazaŭ antaŭgustumo de io plia. Ni certe atendas pluan esploron, kaj duan parton kun analizado de la postmilita periodo, kiu, kiel Garvía mem agnoskas, estos eĉ pli interesa el soci(ologi)a vidpunkto.

## Bibliografio

Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.

### Pri la recenzanto

José Antonio del Barrio, fizikisto. De 2003 ĝis 2011 kaj denove de 2020, direktoro de hispana “Fundación Esperanto”; 2011–2020 prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Aŭtoro de artikoloj pri la historio de la Esperantista Movado, ĉefe en hispanaj kaj esperantaj revuoj, retejoj kaj libroj, inter kiuj biografioj de pioniraj hispanaj esperantistoj, la utiligo de Esperanto dum la Hispana Enlanda Milito kaj la laborista esperantista movado en Hispanio.

Retadreso: jantoniodelbarrio@gmail.com

### About the Reviewer

José Antonio del Barrio, physicist. From 2003 to 2011 and again from 2020, director of the Spanish “Fundación Esperanto”; 2011–2020 president of the Spanish Esperanto Federation. Has published articles on the history of the Esperantist Movement, chiefly in Spanish and Esperanto magazines, websites and books, among which biographies of pioneering Spanish Esperantists, the utilization of Esperanto during the Spanish Civil War and the workers’ Esperantist movement in Spain.

### Sobre el autor de la reseña

José Antonio del Barrio, físico. De 2003 a 2011 y de nuevo a partir de 2020, director de la “Fundación Esperanto” de España; entre 2011 y 2020 presidente de la Federación Española de Esperanto. Ha publicado artículos sobre la historia del movimiento esperantista, principalmente en revistas, sitios web y libros en español y en esperanto, entre ellos biografías de esperantistas pioneros españoles, la utilización del esperanto durante la Guerra Civil Española y el movimiento de los trabajadores esperantistas en España.